ALBRECHT KRONENBERGER
Pastro

D - 67433 NEUSTADT, novembro 2005
Am Wiesbrunnen 29
Telefono: +49 6321 6162
Faksilo: +49 6321 670631
Albrecht.Kronenberger@t-online.de

Karaj membroj kaj amikoj!

## Jen la informoj pri niaj mesoj en Speyer:

Tute aktuale: La lasta **Esperanto-meso** de tiu ĉi jaro **en la katedralo de Speyer** estos dimanĉon, la 20an de novembro 2005, je la 15a horo.

Ni jam fiksis la datojn **por 2006** (ĉiam dimanĉe je la 15a horo en la katedralo de Speyer):

la 26an de februaro
la 30an de aprilo
la 25an de junio
la 27an de aŭgusto
la 26an de novembro

## Jen la du plej gravaj kristanaj eventoj en 2006:

**IKUE-kongreso en Velehrad**, Ĉeĥio, fama morava pilgrimloko,
de la 8a ĝis la 15a de julio
→ Miloslav Šváĉek, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice: m.svacek@seznam.cz

**KELI-kongreso en Strážné**, Ĉeĥio, ĉarma montara loko proksime de Vrchlabí,
de la 12a ĝis la 19a de aŭgusto
→ Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady: cea.polnicky@quick.cz

## Jen aliaj eblecoj, partopreni esperantajn Diservojn:

En **Stuttgart** okaze de la Zamenhof-festo: dimanĉon, la 11an de decembro 2005. Informoj pri loko kaj tempo (same kiel pri la Diservoj en 2006) → Alois Eder, Grabenstr. 63 A, D-71116 Gärtringen: Alois.Eder@t-online.de

Okaze de la kultursemajnfino en **Homburg/Sarlando**: sabaton, la 17an de decembro 2005, post la vespermanĝo. Ankaŭ tiuj, kiuj ne partoprenos la tutan aranĝon, povas kunfesti tiun adventan Diservon. → Oliver Walz, Postfach 2019, D-66470 Zweibrücken: owalz@aol.com

Okaze de IF en **Trier**: dimanĉon, la 1an de januaro 2006, je la 15.30a horo, en la preĝejo St. Martin, Maarstr. 72, proksime de la junulargastejo, kie okazos IF.
→ Hans Dieter Platz: HDP@internacia-festivalo.de

Dum PSI (Printempa Semajno Internacia) en **St. Andreasberg**, montaro Harz, de la 10a ĝis la 17a de aprilo 2006 (Pasko). → Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11, D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler: wolfgang.bohr@esperanto.de

Dum la biblia semajnfino en **Zell am Harmersbach**, de la 5a ĝis la 7a de majo 2006.
→ Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-78050 Villingen: b.eichkorn@t-online.de

Okaze de la katolika foiro en **Saarbrücken**, de la 24a ĝis la 28a de majo 2006 (Ĉieliro). La esperantan meson celebros ĉefepiskopo György Jakubinyi el Alba Iulia, Rumanio. Krome ni okazigos, kiel ĉiun fojon, informstandon. Multaj venu kaj kontribuu!
→ Ulrich Matthias, Rückertstr. 6, D-65187 Wiesbaden: Ulrich.Matthias@t-online.de

Dum la GEA-kongreso en **Braunschweig**, de la 2a ĝis la 5a de junio 2006 (Pentekosto).
→ Wolfram Rohloff, Burgstr. 8, D-04651 Bad Lausick: keli.prezidanto@web.de

Dum la Universala Kongreso en **Firenze**, Italio, de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006
→ Carlo Sarandrea, Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 Roma RM: c.sarandrea@tiscali.it
→ Philippe Cousson, 26 rue de Pré-Ventenet, F-86340 Nouaillé-Maupertuis: keli@chez.com

Kadre de la Mosellanda kunveno en **Zell an der Mosel**, verŝajne en septembro → Bohr (PSI)

Dum la paroliga semajno en **Ĉeĥio** de la 2a ĝis la 8a de oktobro 2006
→ Petr Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice: chrdle@kava-pech.cz

## Jen kelkaj rimarkoj:

Grave: Ĉiam, kiam vi vizitas iun Esperanto-aranĝon kun Diservo, **kunprenu vian ADORU**!

**ADORU estas tre taŭga kristnaska donaco**. Ĉefe la leda eldono estas tre altvalora (sed tre multekosta, 48 Eurojn, dum la normala eldono, 19,80 Eurojn, estas vere prezinda). Kiu aĉetas tri ekzemplerojn, pagas nur du. **Bonvolu mendi ĉe Bernhard Eichkorn**, Romäusring 20, D-78050 Villingen, faksnumero: +49 7721 8787063, retpoŝto: b.eichkorn@t-online.de
B-landanoj povas interkonsenti kun li pri la prezo.

## Fine du petoj:

Tiuj, kiuj per retpoŝto ricevas tiun ĉi rondleteron, **bonvolu pludoni** ĝin ankaŭ al siaj samdomanoj, kiuj estas membroj, kvankam ilia nomo ne estas menciita en la adreso.

Se vi ricevas la rondleteron paperpoŝte, kvankam vi havas retadreson, **bonvolu tuj anonci al mi vian retadreson**, ĉar la elektronika sendado estas pli rapida, pli facila kaj pli malmultekosta. Dankon!

Mi, kune kun Anton Kiefer kaj Manfred Ritthaler, deziras al vi benatan Kristnaskon kaj sanan novan jaron.

*Albrecht Kronenberger*

*ADORU • aĉetu ĝin • ADORU • uzu ĝin sola • ADORU • uzu ĝin en via familio • ADORU • uzu ĝin en viaj Esperanto-rondoj • ADORU • uzu ĝin en Diservoj • ADORU • informu pri ĝi • ADORU • rekomendu ĝin • ADORU • montru ĝin al via paroĥestro • ADORU • montru ĝin al via eklezia muzikisto • ADORU • pludonacu ĝin • ADORU • mendu tri ekzemplerojn • ADORU • pagu nur du • ADORU • decidu, ĉu tolo aŭ ledo • ADORU • faksu aŭ retpoŝtu al Bernhard Eichkorn • ADORU*

Jen nia konto: Esperanto-AG, numero 30678 ĉe LIGA-Bank, bankkodo 75090300